## 83-A SAT KONGRESO - 31a Julio - 6a Aŭgusto 2010
### Braŝovo Rumanio

Por pliaj informoj, kiam haveblaj, kontaktu **la peranton** (vidu paĝon 10) aŭ vizitu **<http://www.sat-esperanto.org>.**

**Koresponda adreso:** Ĉefa kontakt-adreso: Rodica TODOR B-dul Valea Cetatii 22, bl. B 24, sc. A, ap. 5, 500289-Brasov, Romania, tel.+40 722 792849
rete : rodica_todor ĉe yahoo.com

**OKK:** Franjo Leveque-Provost, Guy Martin, Rodica TODOR, Constantin MARCU, Mihaela MARCU, Gabriella Tibuleac, Cristina ALDESIU, Maria-Elena COCUZ, Rada VOICA

| **Kongreskotizoj (€)** | Ĝis 30.04.09 | Ĝis 30.06.09 | Poste |
|---|---|---|---|
| SAT-membro | 50 | 55 | 60 |
| SAT-geedzoj(se ambaŭ) | 80 | 85 | 90 |
| SAT-junuloj ĝis 25 j. | 25 | 30 | 35 |
| Nemembro | 60 | 65 | 70 |
| Junula nemembro | 30 | 35 | 40 |

- Infanoj ĝis 15 jaroj ne pagas kotizon

* La partoprenantoj el CZ, EE, HU, LT, LV, PL kaj SK ĝuas 30% rabaton.

* La partoprenantoj el AL, BG, RO, eksa YU (krom SI), kaj eksa SU (krom EE, LT kaj LV) kaj ekster Eŭropo (krom Aŭstralio, Israelo, Japanio, Kanado, Sud-Afriko kaj Usono) ĝuas 50% rabaton.

* Kongresaneco ne transdoneblas al alia persono.

* La kotizo ne inkluzivas manĝadon kaj loĝadon, ekskursojn kaj aliajn aparte pagendajn aferojn, ankaŭ nenian asekuron.

* La kotizo ne estas repagebla senkonsidere pro kia kaŭzo la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson.

* Aliĝilon sen pago de kotizo kaj prezo de unu tranokto OKK ne traktos

**ATENTU: Tiuj, kiuj bezonas enirvizon al Rumanio, bonvolu memprizorgi por akiri ĝin. OKK povas sendi nur invitleteron post la ricevo de la pasportnumero sur la aliĝilo. Al nealiĝantoj OKK ne sendas invitleteron.**

Kongresejo: Liceo Andrei Ŝaguna - festa salono (en la centro de la urbo).

Loĝado: Hoteloj de €10 ĝis €27 por persono por unu nokto

**Komunikiloj:** En Rumanio ekzistas la servo "roaming" por ĉiuj komunikad-retoj per poŝtelefonoj.Ĉi tiu servo utilas ne nur en tuta Eŭropo sed ankaŭ ekster Eŭropo. La tarifoj estas tiuj de EU (Europunio).

### 83rd SAT Congress 2010

*These congresses are one of SAT's main activities, combining AGM activites with plenty of opportunities to hear about and discuss progressive issues and with some tourism as well. The participants will come from many different parts of the world, so the programme will be in Esperanto only, the working language of SAT. Also the volunteer organisers can only deal with their local language and Esperanto. For practical reasons, a sufficient knowledge of Esperanto is required by all those not accompanied by an Esperantist.*



Gazeto de Sennacieca Asocio Tutmonda en Britio

# La Verda Proleto

Journal of Workers' Esperanto Movement (SATEB)

Numero 433 ~~~ Aprilo 2010

## 'Formo sekvu funkcion …'

Kiuj elektis la nomon de nia asocio - SATEB - bone elektis. Ĝi ne rivalas SAT mem, sed eĉ per sia nomo, subtenas SAT: 'SAT en Britio'. Kvankam nia tutmonda asocio estas sennacieca, pro praktikaj kialoj, utilas havi unuojn, kiuj facile kaj rekte rilatas al la institucioj, kiuj influas politikojn pri laboro, ekonomio, socia justo kaj homaj rajtoj: ne nur registaroj sed sindikatoj, politikaj partioj, premgrupoj, amaskomunikiloj kaj cetere. Tial oni kreis 'laboristajn Esperanto-asociojn' (LEAojn) en la ĉefaj landoj/lingvaj teritorioj, kie troviĝas SATanoj. En Francio, 'SAT-Amikaro' pli grandas ol SAT mem, kaj rivalas la (neŭtralan) landan asocion laŭ membronombro kaj agado. Oni povus eĉ argumenti, ke ĝi tro grandas, tro fortas, por sia ĉefa rolo, subteni SAT mem. Sed tio estas la escepto: en aliaj kazoj, ink. SATEB, la koncernaj LEAoj ja estas subtenantaj asocioj de SAT, en siaj respektivaj lingvo-teritorioj.

Pro tiu ĉefa rolo de LEAoj, pli gravas la efikeco de la LEA ol ties formo kaj statuta karaktero. Ne ĉiam nepras formalaj, statutaj 'asocioj' por efike subteni kaj plifortigi la agadon de SAT. Fakte, SAT mem lastatempe pli emfazas la rolon de 'SAT-grupoj' en specifaj lokoj, ekz. Parizo kaj aliaj francaj urboj; Antverpeno/Flandrio; Milano/Lombardio, Londono/suda Anglio; Barcelono/Katalunio. kaj tiaj plu. Kiel oni diras en la arkitektura mondo, 'La formo sekvu la funkcion.'

En Britio, dum pluraj jaroj, SATEB iom feblas. La membraro ŝrumpis kaj, pli grave, ene de la membraro, mankas aktivuloj por iniciati kaj gvidi adekvatan agadon. Rezulte, ni elspezas pli da tempo kaj energio pri la funkciado de la asocio (kaj ĝia statuto) ol pri la celoj de SAT! Tion oni konstatis antaŭ kelkaj jaroj; sekve, okazis en la komitato de SATEB pasia debato pri kiel respondi al la evidentaj faktoj. Fine decidiĝis, ke ni 'suspendu' la statutan funkciadon de la asocio, ke ni elektu 'kuratoran komisionon' por prizorgi la havaĵon de la asocio, tiel ke la disponeblaj rimedoj (tempo, energio, mono, bonvolo) estus uzataj por la agado - kia La Verda Proleto mem - anstataŭ por la burokratio. (daŭrigo p. 3)

### *'Form follows function …'*

*- an English translation appears on page 6*

# * S.A.T.E.B *

## WORKERS'ESPERANTO MOVEMENT


Prezidanto / *Chairperson* Ed Robertson 52 Easter Drylaw View, Edinburgh EH4 2QP
Tel: 0131 3329808 <ed-robertson@teleosvet.co.uk>

Sekretario / *Secretary*: David Kelso 5 Craigenhill Road, Kilncadzo, Carluke, ML8 4QT
Tel: 01555 759166 <davidekelso@yahoo.co.uk>

Kasisto / *Treasurer* Arturo Prent, 7 Walton Gardens, Hutton, BRENTWOOD, Essex CM13 1EJ Tel: 01277 228962 <arturo@signalprent.demon.co.uk>

**La Verda Proleto** Redaktoro / *Editor* Laura Miller, 68 Etherly Rd, LONDON N15 3AL
Tel: 020 8800 5120 <lauramiller1216@hotmail.com>


**Pri la enhavo de kontribuaĵoj respondecas nur la aŭtoroj mem.**
***Views expressed by contributors are the responsibility of the authors alone***

## KOTIZOJ / *SUBSCRIPTIONS*

**La SATEB-kotizo por 2010 estis pagenda en januaro.**
**Se vi ankoraŭ ne pagis, bonvolu tuj pagi.**
***The SATEB subscription for 2010 was due in January.***
***If you haven't yet paid please do so now***
Detaloj kaj formularo je paĝo 9 / *Details and form on page 9*

### La SAT-kotizo por 2010 pagendis en januaro

**Se vi ankoraŭ ne pagis, bonvolu tuj pagi** (vidu paĝon 10).

### LVP kopioj en la Biblioteko Butler

Geoffrey King serĉas jenajn mankantajn ekzemplerojn: De la fino de 1998 ĝis n-ro 414. Tiam 415, 416, kaj 425. Se vi havas bonkvalitajn ekzemplerojn, bonvolu kontakti lin ĉe EAB.

### Alwyn Kind

Alwyn Kind mortis la 30an de novembro 2009. Ano de SATEB ĝis antaŭ kelkaj jaroj, ŝi faris vastan laboron por LabourStart - efektive centoj da artikoloj tradukitaj lastatempe.

*Alwyn Kind died on November 30th 2009. A member of SATEB until a few years ago, she did vast amounts of work for LabourStart - literally hundreds of articles translated over recent years.*


**DANKON -** Ni daŭre dankas al Paul Gubbins pro lia zorga kontrolado de LVP.
**THANK-YOU** - We are always thankful to Paul Gubbins for his conscientious checking of LVP


**LVP 434** Kontribuaĵoj invitataj - limdato 31-an de aŭgusto 2010
*Contributions are invited - to reach us by 31st August 2010*



## 83-A SAT KONGRESO 2010 - Ekskursoj

BRAŜOVO, la urbo-fortikaĵo ĉe la malsuproj de monto Tâmpa
SIBIU - La kultura ĉefurbo de Eŭropo en 2007
Kastelo Bran - Historio kaj legendo
SINAIA - La Perlo de Karpatoj
POSTKONGRESO - La DELTO de DANUBO

### BRAŜOVO, la urbo-fortikaĵo ĉe la malsuproj de monto Tâmpa

Corona (Korona), Kronstadt, Brasso aŭ Braşov (Braŝovo) estas fakte la sama urbo, malnova de pli ol sep cent jaroj. La urbo-fortikaĵo konata kiel „la urbo ĉe la malsuproj de Tâmpa”, disvolviĝis pere de siaj loĝantoj - germanoj, hungaroj kaj rumanoj - kiel forta komerca, ekonomia, kultura kaj turisma centro.

### SIBIU - La kultura ĉefurbo de Eŭropo en 2007

La urbo Sibiu, danke al sia arkitektura heredaĵo estas pritaksata kiel unu el la plej belaj kaj bone konservitaj historiaj urboj el Rumanio kaj Eŭropo. La mezepoka fortikaĵo de la urbo restis nedetruita en la du mondmilitoj, kaj gardas ankoraŭ la spiriton kaj la etoson de la pasintaj jarcentoj. La unua nacia muzeo estis inaŭgurita ĉi tie en la 25.02.1817, la unua societo pri muziko ekfunkciis en la jaro 1818. Sur la scenejoj de Sibiu koncertis famaj muzikistoj kiel Franz Liszt kaj Johann Strauss.

### Kastelo Bran - Historio kaj legendo

Troviĝanta 30 kilometrojn sude de Braŝovo, en la montpasejo Rukar-Bran, inter Montoj Bucegi (Buĉeĝi) kaj Piatra Craiului (Reĝa Ŝtono), la kastelo estas grava nacia monumento kaj gvidosigno de la rumana turismo.

Ĝi famas pro ĝia beleco kaj la ĉirkaŭanta pejzaĝo, sed ĝia famo ligiĝas al la legendo de la Grafo Drakulo, kies etoso ankoraŭ hantas ĉi tiujn praajn regionojn.

### SINAIA - La Perlo de Karpatoj

Ĉe la malsuproj de la montoj Buĉeĝi kaj Baju, la ĉefurbo de la fama Prahova Valo, Sinaia (Sinaja) estis unuafoje menciita en dokumentoj en la jaro 1690, sub la nomo Izvorul (La Fonto).

Ekde 1874 ĝi portas la nunan nomon – ‘Sinaia’ – nomo, pri kiu la tiutempaj dokumentoj supozas, ke ĝi devenas el ‘Sinajo’, la Sankta Monto, vizitita de Spătarul Mihai Cantacuzino (Princo Mihajlo Kantakuzino) – tiu, kiu konstruigis en la urbo la monaĥejon ‘Endormiĝo de la Dipatrino’ (1690-1695), laŭ la modelo de la monaĥejo ‘Sankta Helena’ sur la monto Sinajo.

### La DELTO de DANUBO

La Delto de Danubo troviĝas ĉe la kruciĝo de la 45-a paralelo de norda latitudo kun la 29-a meridiano de orienta longitudo. La surfaco de tiu areo mezuras 5.640 kvadratajn kilometrojn, el kiuj al Rumanio apartenas 4.340 km kaj al Ukrajno 1.300 km. Proksimume 80% de la rumana Delto - t.e. 3.660 km - troviĝas sub la nivelo de la Nigra Maro kaj nur 16% - proksimume 680 km - estas neinundeblaj.

***83rd SAT Congress 2010*** *See footnote next page.*

# Sennacieca Asocio Tutmonda - SAT

Tutmonda forumoj, rektaj kontaktoj - per tiuj SAT celas antaŭenigi informadon kaj interkomprenon inter laboristoj kaj progresemuloj, por helpi forigi maljustecon ktp.

SAT uzas la racie elpensitan lingvon **- Esperanto -** por atingi siajn celojn.

*Worldwide forums, direct contacts - by these S.A.T. aims to promote knowledge and understanding amongst workers and progressives to help overcome injustice etc. - using the rational language **Esperanto** to achieve its aims.*

La demokrata strukturo de SAT estas inter-membra, ne inter-'nacia'.
*SAT's democratic structure is based on members, not on national boundaries. Note that the worldwide nature of SAT means that only Esperantists may join.*

SAT kongresas ĉiujare en diversaj mondo-partoj, "Sennaciulo" aperas preskaŭ ĉiumonate, "Sennacieca Revuo" (literatura revuo) aperas jare. Adresaro (regule ĝisdatigita) ebligas rektajn kontaktojn inter la anoj. SAT eldonas librojn kaj broŝurojn kongrue al la celoj, kaj laŭnecese vortarojn, aliajn librojn, ktp.

**Membro-kotizo: £45**. Membroj ricevas "Sennaciulo"-n, "Sennacieca Revuo"-n, kaj adresaron, kaj rajtas pagi rabatan kongres-kotizojn.
(Minimume £23 por tiuj kiuj vere ne kapablas pagi la plenan kotizon)
**Dumviva membreco** nun havebla - **£1125** - rabato ne haveblas.
Nemembroj rajtas aboni al "Sennaciulo" kun "Sennacieca Revuo" kontraŭ £50. Sendu monon (se en britaj pundoj) al la peranto, ne al SAT.

Oficejo: SAT, 67 Ave Gambetta, F-75020 Paris, France. Retadreso: <satesperanto@free.fr> TTTpaĝo:<http://www.sat-esperanto.org>

**Uzu la suban formularon por informpetoj kaj pagoj por Britio**, kaj sendu al la peranto: Arturo Prent, 7 Walton Gdns, Hutton, Brentwood, Essex, CM13 1EJ (Ĉekoj pagendaj al "SAT") Retadreso: arturo@signalprent.demon.co.uk

*tranĉu* >- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

***Sendu al la peranto (vidu supre)***

☐ Bonvolu sendi pli da informo pri SAT ☐ Bonvolu sendi aliĝdeklaron ☐ Bonvolu sendi informon kaj aliĝilon por la SAT-Kongreso

☐ Realiĝo / abono Dato ______________________

Nomo ______________________________________________

Adreso ______________________________________________

______________________________________________

(nedevigaj)-> tel: ______________________________________

retadreso: ______________________________________

☐ Marku, se ni rajtas sendi viajn detalojn al aliaj Esperanto-organizaĵoj

Mi kunsendas:- kotizon £_______+ donacon*£________sume:- £_________

per ĉeko/poŝtmandato/______________ (ĉekoj al "SAT.")

*celo por donaco________________________________



## SATEB-JARKUNVENO 2010 / *AGM 2010*

La jarkunveno okazos kadre de Diskutrondo (Drondo), 22-24 oktobro 2010. **ĉe:**
*The AGM will take place during the Discussion Weekend (ODD), 22-24 October 2010* ***at:***

**Wedgwood Memorial College** Station Rd Barlaston Stoke-on-Trent ST12 9DG

Detaloj de la Drondo haveblas ĉe: / *'ODD' details available at:*

**Esperanto-Asocio de Britio -** Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. http://esperanto-gb.org/eab/eab_events.htm

La kunveno okazos en Esperanto /*The meeting will be in Esperanto*.

**Vi rajtas veni nur por la jarkunveno,** sed se vi volas refreŝigaĵojn, aŭ tranokton, tion vi devos aranĝi kun la kolegio (adreso supre). Se vi ne jam aliĝis, kaj aliĝilo por Drondo ne troviĝas kun LVP, bonvolu peti de EAB (adreso supre).

Por kuraĝigi partoprenon, la komitato pagos al la unuaj ses membroj, kiuj tion petas, duonon de la vojaĝkostoj (maksimume £50).

Se pro manko de spaco en la kolegio necesos loĝi ekstere je pli alta kosto por simila komforto, SATEB pretas pagi la diferencon.

***You may come to the AGM only**, but if you want refreshments, or to stay overnight, you must arrange this with the college (address above).*

*If you haven't already enrolled, and the leaflet with application form for ODD is not with LVP, please contact EAB (address above).*

*To encourage attendance, the committee will pay, to the first six members who ask for it, half their travel costs (maximum £50).*

*If through lack of space in the college you have to stay outside at greater cost (for similar facilities), SATEB is prepared to pay the difference.*

### 'Formo sekvu funkcion …' (fino)

Tiun proponon la komitato prezentis al la jarkunveno en Londono en 2007, sed fine la kunveno (konsistanta el la komitato plus unu-du kromaj membroj!) decidis lasi la nunan aranĝon, esperante, ke aperos junaj, energiaj, ideoplenaj salvantoj. Du jarojn poste, nenio ŝanĝiĝis, do la komitato re-prezentos la proponon al la jarkunveno en oktobro 2010 por rekonsidero.

Ne necesas diri, ke, se iam alvenos novaj, energiaj SATanoj por revigligi la asocion, oni povos tuj refunkciigi ĝin, simple alvokante ĝeneralan kunvenon de la membraro. La statuto restus valida, kvankam 'en suspendo'. Intertempe, ni aktivaj membroj povos agi laŭvole, kontribuante al la celoj de SAT. Persone, mi proponus, ke ni daŭre pagu kotizon por La Verda Proleto kaj penu kunveni - kvankam neformale - unufoje jare, ĉu en Barlastono, ĉu en Londono, ĉu aliloke. Sed tiuj estus demandoj por la aktivularo, ne por unu homo, ne por komitato.

David Kelso

## 'Agu' estas la pivota vorto.

La admono ofte citata, 'Pensu tutglobe, agu loke' ŝajnas indiki laŭ diversaj direktoj, kiam temas pri sanservoj. En Usono, kiel ni jam vidis, la agado devas direktiĝi al senatanoj kaj kongresanoj, ĉar estas tiuj, kiuj havas la povon realigi ŝanĝojn.

Ĉi tie en Britio, granda parto de la nacia sanservo (NHS) estas jam 'eksterigita' (= privatigita. Provu trovi sidlokon en dializejo, por konstati kiom da estas en hospitaloj NHS-aj). Ni devas diversmaniere klopodi por konservi niajn sanservojn.

Kie mi loĝas - unu el la plej malriĉaj municipoj en Anglio - dokumento malkaŝiĝis, ke la kunagantaj estraroj de du hospitaloj volis malestigi la unusolan fakon pri urĝaj kazoj en mia distrikto, relokonte ĝin, kaj la 80000 homojn, kiuj ĉiujare uzas ĝin, al apuda distrikto. Kaj ĉar la du hospitaloj tion faras por ŝpari monon, de kie venus kroma financo por la nova pacientaro?

Ekondiĝo da lokaj individuoj, parlamentanoj, sindikatoj, estigis komisionon por kontraŭi tion. Se ne okazintus tiu malkaŝiĝo, post unu jaro, kiam oni decidintus, okazus falsa 'konsultado', kiam ĉiuj demandoj estus glataĉe disbatitaj.

Jes, mi iom cinikas - tamen, mi jam vidis ĉi ĉion, sen la malkaŝiĝo. Mi ne scias ,kiu sistemo estas preferinda - aŭ ĉu efektive unu el estas - sed mi opinias, ke la pivota punkto en ambaŭ lokoj estas la vorto 'Agu'. Se ni ne agos, eblas, ke eventuale ni havos nenion, sur ambaŭ kontinentoj.

**Laura Miller**

## *'Act' is the pivotal word*

*The oft quoted exhortation to 'Think globally, act locally' seems to point in different directions when it comes to health care. In the States, as we have seen, the action comes from Senators and Congressmen, because they are the ones with the power to vote on, but not to implement, the 'action'"*

*Here in Britain, much of the NHS has been 'outsourced' - translation: privatised. (Try to find a seat in a dialysis unit and see how many there are in NHS hospitals) We have to work differently to keep our health care.*

*Where I live – one of the poorest boroughs in England – a paper was leaked, showing that the combined managements of two hospitals wanted to close down the one existing A&E department near my borough and move it, and the 80,000 people who use it every year, to a neighbouring borough. And since the two hospitals are doing this to save money, where would extra funding come from for this new influx?*

*A groundswell of local individuals, MPs, trade unions formed a committee to fight it. If we had not had the leak, in a year's time when the decision was made, we would have had a sham 'consultation' in which all of the questions would have been smoothly batted away.*

*Yes I'm a little cynical – but then I've seen all this before, without the leak. I don't know which system is better – or if one is better – but I think the emphasis in both places is the word 'Act'" If we don't, we may wind up with nothing at all, and have to start all over fighting for what we need, on both continents.*

***Laura Miller.***



# SATEB

## *WORKERS' ESPERANTO MOVEMENT*

Sennacieca Asocio Tutmonda en Britio celas 'diskonigi kaj instrui la internacian lingvon Esperanto kaj antaŭenigi la ideojn de S.A.T.'
- celas venigi Esperanton al ĉiuj progresemaj organizoj.
*SATEB - aims 'to make known and teach the international language Esperanto, and promote the ideas of SAT.'*
*- aims to bring Esperanto to the notice of all progressive organisations.*

Por informo pri SAT bonvolu vidi la venontan paĝon.
*For information about S.A.T. please see the next page.*

SATEB estas sendependa de SAT, sed aktive subtenas ĝin per disvastigo de informoj pri ĝiaj principoj kaj laboro, kaj per organizado de kunvenoj ĉiujaraj.
SATEB *is independent of S.A.T., but actively supports it by spreading information about its principles and work, and by organising yearly meetings.*

**Por pli da informo** bonvolu sendi la suban formularon al la sekretario:
***For further information*** *please send the form below to the secretary:*
David Kelso 5 Craigenhill Road, Kilncadzo, Carluke, ML8 4QT
aŭ **retu** al / *or* ***email*** *to*: <arturo@signalprent.demon.co.uk>

Membrokotizo, inkluzive / *Membership, including* : 'La Verda Proleto': £7.00
(tiuj kun malaltaj enspezoj -minimume / *those with low incomes -min.*: £3.00)
(Abono nur por / *Subscription only for* : 'La Verda Proleto': £5.00)

Realiĝoj:- sendu formularon kaj pagon al la kasisto (adreso p. 3)
*Renewals:- send form and payment to treasurer (address on p. 3)*

*cut* > - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - < *tranĉu*

☐ *Information request* Informpeto ☐ *Please send membership form* Bonvolu sendi aliĝilon ☐ *Renewal* Realiĝo

*Name* / Nomo ______________________________

*Address* ______________________________

/ Adreso ______________________________

(*optional* / } *Phone* / Telefono ______________________________

nedeviga )} *email* / retpoŝto ______________________________

*You may send my details to other Esperanto organisations* ☐
Vi rajtas sendi miajn detalojn al aliaj Esperanto-organizaĵoj

*I enclose* / : } *membership* / kotizon £_________ *donation* / donacon £_________
Mi kunsendas } *subscription* / abonon

*Date* / dato_____________________ *Total /* Sumo: £__________

*cheque/PO/other* ______________ ĉeko/poŝtmandato/alia______________

*cheques etc. payable to* / ĉekoj ktp. pagendaj al "SATEB"

## ADIAŬ AL VILĈJO SIMCOCK (1918 - 2008 )

Vilĉjo (Bill) Simcock mortis, aĝe 89. Li estis forta subtenanto de Esperanto, kaj en SAT kaj en la neŭtrala movado. En aŭtuno 2004 li transprenis la prezidantecon de SATEB je kriza momento, tiel helpante al SATEB pretervivi.

Vilĉjo devenis de la 'Potlando' (Potteries), militservis dum la dua mondmilito kaj helpis sian patron kiel laboristan kandidaton en la landa baloto, 1945. Kariere, li estis instruisto kaj lernejestro en Staffordshire dum 22 jaroj. Post la emeritiĝo, li instruis Esperanton kaj mondvojaĝis por promocii kaj instrui la internacian lingvon. Li verkis rakontojn kaj tradukis aliajn, eldonitajn en libro titolita 'Humuraĵoj'.

La tuta Esperantio sentos la mankon.

## *GOODBYE TO BILL SIMCOCK (1918-2008)*

*Bill Simcock died at the age of 89. He was one of Esperanto's supporters, working in EAB and SATEB. In the autumn of 2004, he took over the chair of SATEB at a critical moment, and helped SATEB to survive.*

*Bill came from the Potteries, served during World War II, and helped his father stand as a Labour candidate in the 1945 general election.*

*He was a teacher and head teacher for 22 years in Staffordshire.*

*When he retired, he taught Esperanto, and travelled the world in order to promote and teach the International Language. He authored stories and translated others which were published in a book entitled Humuraĵoj.*

*The world of Esperanto will miss him.*

### ***'Form follows function …'*** *(conclusion)*

*Two years on, nothing has changed, so the Committee will re-present the proposal to the AGM in October 2010, for reconsideration ….*

*Needless to say, should there ever appear new, energetic SATanoj to revive the association, it could be immediately reactivated simply by calling a general meeting of members. The constitution would remain valid, albeit 'in suspended animation'. In the meantime, we active members can carry on as we think best, supporting the goals of SAT. Personally, I would favour continuing a subscription, for LVP, and aiming for a meeting (albeit informal) at least once a year, whether in Barlaston, London, or elsewhere, but these are matters for the active membership, not for one person, not even for the committee.*

*David Kelso*



## LINGVA ANGULO

AMO aŭ AMORO?

Laŭ tradicioj je la festtago de St-a Valentino, nia ĉi-monata temo estu romantika amo. Kiel do oni esprimu tion en la Internacia Lingvo? La unuaj du aŭ tri generacioj de la movado uzis la vorton, amo. Samtempe, am- uziĝis ankaŭ por amo inter parencoj kaj inter amikoj. Ĝi eĉ aperis en la frazon, Mi amas Esperanton! Kio do pri erotika amo? Ĉu amo estis sufiĉe forta kaj specifa por tio? Jes ja. Nur rigardu la okulfrapan sed klasikan poezian kolekton, la Libro de Amo.

Nuntempe, la kutima uzado por seksumado estas amoro. Atentu: la radiko ĉi tie estas amor--, kaj ne -am-. Tiu distingo estas kaj helpema kaj necesa, por eviti konfuzon, ĉu skribe ĉu parole. Ĝi aperas kiel nura neologismo, kiun oni devas parkerigi, sed ĝi estas pli ol tio. Amoro koncize kaj senambigue apartigas seksajn aferon for de sentimento, kaj korpajn aferojn for de la kavalirumaj, sed samtempe ebligas kruĉiĝon de ĉio tio, ĉe idealaj cirkumstancoj je amrilatoj.

La radikon, am-, oni tamen daŭre tenas, por multaj kuntekstoj erotikaj kaj duon-erotikaj. Amindumi, ekzemple, signifas la agojn karesi, kisi, flustrumi, ktp. Geamantoj estas ofta termino, signifante koramikojn. Eble tiaj aferoj neniam fariĝos science precizaj, malgraŭ ĉiuj lingvistikaj streboj - eble pro tio, ke la romantika amo mem preskaŭ neniam estas simpla afero.

David Thornell

*AMO or AMORO?*

*In keeping with Valentine tradition, this month's theme is love - romantic love. Just how does one express it in the International Language? In the first two or three generations of the movement, it was amo. Yet am- also referred to love between relatives, and between friends. It was even used in the phrase, Mi amas Esperanton! What about erotic love, though? Was amo considered strong and specific enough for that? Yes. One need only look at the explicit but classic poetry collection, known as the Libro de Amo.*

*Nowadays, however, the accepted usage for physical love is amoro.*

*Note that the root is amor-, not am-. The distinction is not only useful, but necessary, to avoid confusion in both written and spoken Esperanto. It may appear to be merely another neologism to commit to memory; but it is more than that. Amoro succintly and unambiguously segregates the sexual from the sentimental, and the corporeal from the courtly, while still allowing for overlap in idealized instances of what are now known as 'relationships'.*

*The root of am- is still retained for many erotic and semi-erotic contexts, nevertheless. Amindumi, for example, means to canoodle (along with kveri); and geamantoj is a common term for lovers (as is koramikoj). Perhaps such matters will never be cut-and-dry, despite all linguistic efforts; perhaps because romantic love itself is rarely a simple affair.*

*David Thornell*

## *'Form follows function ...'*

*Whoever chose our association's name - SATEB - chose well. It doesn't rival SAT; rather, even in its name, it supports SAT: 'SAT en Britio'. Although our worldwide association is a-national (sennacieca), for purely practical purposes, it makes sense to have entities which can easily and directly relate to those institutions influencing policy regarding employment, economic affairs, social justice and human rights: not only governments, but trade unions, political parties, pressure groups and such like. Thus were created 'Workers' Esperanto Associations' (LEAs) in those countries and language-territories where there are SAT members. In France, SAT-Amikaro is bigger than SAT itself, and even rivals the (neutralist) national association in numbers and activity. One might even argue that it is too big, too powerful, for its main purpose - to support SAT. That, however, is the exception: in other cases, including SATEB, the LEAs are indeed supporter associations of SAT, in their respective language-territories.*

*For that reason, the effectiveness of the LEA is more important than its form, its constitutional status. We don't necessarily need formal 'associations' to effectively support and strengthen the work of SAT. In fact, recently, SAT has emphasised the role of 'SAT Groups' in particular places, like Paris and other French towns; Antwerp/ Flanders; Milan/ Lombardy; London/ southern England; Barcelona/ Cataloni.a etc. As they say in architecture, 'Form follows function'.*

*In Britain, for some years, SATEB has been limping somewhat. The membership has shrunk and, more important, within the membership, there has been a lack of 'activists' to initiate and lead activities. As a result, we have spent more time and energy on the functioning of the association (and constitution) than on the purposes of SAT! This became apparent a few years back; discussion followed within the committee, on how best to respond to these facts. Finally, it was agreed that we should 'suspend' the constitutional functioning of the association, elect a 'trustee committee' to look after the property, so that the resources available (time, energy, money, goodwill) would be used for activity - such as LVP itself - instead of for bureaucracy. The committee presented this proposal to the AGM in London in 2007 but in the event the meeting (consisting of the committee plus a couple of other members!) decided to let things be, hoping that there would appear young, zestful rescuers, full of new ideas. Two years on, nothing has changed, so the committee will re-present the proposal to the AGM in October 2010, for reconsideration.*

*(continued on page 8)*



**LabourStart** **(http://www.labourstart.org/eo/)**

**Kie sindikatanoj komencas sian tagon sur la reto** **Tutmondaj sindikataj novaĵoj**

La esperanta ttt-paĝo de la sindikata ttt-paĝaro prizorgata de Eric Lee daŭre funkcias. Ĝi ĉiam bezonas pli da ret-ligataj helpantoj, kiuj kapablas resumi esperante anglalingvajn artikolojn.

**Post la morto de Alwyn Kind, mankas kompetenta tradukisto.** Paul faras kio eblas, sed se vi opinias ke vi povos helpi, aŭ konas iun kiu eble povos, bonvolu kontakti: **Paul Hewitt <paul@esperanto.freeserve.co.uk>.** Se ne estas granda risko ke ni Labourstart ne plu havos Esperantajn paĝojn.

Intertempe, ni tre dankas al Paul Hewitt, David Curtis, Alwyn Kind kaj la Grimsby Esperanto-Grupo pro iliaj ĝisnunaj laboroj.

### Tutmondaj sindikataj novaĵoj

Italio Distriktaj juĝistoj strikis pro kalumnioj 02-Feb-2010
Usono Infanlaboristoj en Usono 11-Jan-2010
Hungario Transporto-sindikato strikos 03-Jan-2010
Francio Francaj dokistoj preparas strikojn 26-Dec-2009
Britio Sindikatanoj evitas strikojn dum la feria periodo 26-Dec-2009
Ĉeĥio Ĉeĥaj dungitoj de Hyundai denucas siajn laborkondiĉojn 06-Dec-2009
Irlando Stratprotesto 15-Nov-2009
Algerio Sindikatoj protestas 15-Nov-2009
Usono 15.7 milionoj sen laboro 15-Nov-2009
Irlando Fino de disputo 07-Nov-2009
Usono Komploto kontraŭ sanreformo 07-Nov-2009
Pollando Nepagitaj laboristoj 07-Nov-2009
Porto-Riko Protesto pri maldungo 24-Oct-2009
Francio Sinmortigo pro laboro 24-Oct-2009
Venezuelo Internacia solidareco 13-Oct-2009

Unu raporto el la granda paĝaro:-

### Italio: Distriktaj juĝistoj strikis pro kalumnioj - 02-Feb-2010

En Italio distriktaj juĝistoj strikis ĉe la semajnfino proteste kontraŭ atakoj de ĉefministro Silvio Berlusconi.

Gvidanto de la nacia sindikato por juĝistoj Gioacchino Natoli diris, ke s-ro Berlusconi karakterizis juĝistojn kiel 'ekzekutistojn, komunistojn, kloakaĵon kaj kanceron.'

'Jen kelkajn vortoj, kiujn la ĉefministro kaj liaj deputitoj uzis por karakterizi nin, kaj ni strikas, ĉar ni ne volas esti daŭre la celo de ĉi tiu agreso,' li diris.

*(Labourstart is a web site for trade union news. It has reports in Esperanto as well as many other languages.)*